

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Gastprelegos d-ro Ulrich Lins!

Partoprenu en la 48a Zamenhof-Festo en Kanagavo!

*dec. 16, 13h00-16h30

*Placo de Kanagawa por Tergloba Civitaneco (proksime al la Stacio Hongoodai)

*kotizo: 1000 enoj (500 enoj por junuloj ĝis 35-a jaro)

programo

13h00: Malfermo

13h10: Kantoj

13h30: Prelego de d-ro Ulrich Lins:

“Antaŭ cent jaroj: esperoj pri nova mondo”

14h30: Raporto pri la 103-a Universala Kongreso en Lisbono

14h45: Prezento de Esperantaj Libroj

15h00: Prezento de Rondo en Gubernio Kanagavo

15h15: fotado kaj ripozo

15h30: 2 fakkunsidoj en apartaj ĉambroj (detalo planata)

16h25: ferma saluto

Kontakto: info@esperanto.yokohama

Niaj Planoj

([KK]=nia kutima kunveno, nome Kanagawa-Kenmin-Senta, proksime de la Stacidomo Jokohama)

*nov. 17 [KK] La daŭrigo de “kunveno raporti siajn spertojn”, okazinta en la 1-a de septembro: De 13h00 ĝis 15h00, 4 el niaj rondanoj parolos Esperante pri sia sperto.

*dec. 1 [KK] La 113-a Legokunsido: diskutota estas pri “Kie miozotas memor” de Ed Borsboom.

*jan. 27, 2019 [KK] La jarkunveno de nia rondo “NPO Esperanto Jokohama”

Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj (kutime en [KK])

*Regulaj Klasoj en sabato

(1) Klaso “Eseoj”, por legi “Tamen ĝi moviĝas!” gvidate de Doi Hirokaz

(2) Jokohama Salono. 2 fojojn monate oni legas “Mondo de travivaĵoj” de Tibor Sekelj, 1 fojon – libera frazfarado; kaj alian fojon – tradukado laŭ sia plaĉa fonto

*Regulaj Klasoj en merkredo

(1) Klaso “Belĉielo”, por legi “Kuniberto kaj Kilevamba”, gvidate de Doi Ĉieko

(2) Klaso “eriko”, por legi “Kuniberto kaj Kilevamba” gvidate de Doi Ĉieko

*Neregula Klaso

(1) Klaso “Belflora”: por legi “Kuniberto kaj Kilevamba”, per la gvido de Doi Ĉieko, du fojojn monate



Prezentado

Kiel ni notis en nia septembra n-ro, entute 11 personoj prezentis “sian sperton” esperantlingve en nia kunsido en la 1-a de septembro. El la prezentoj, ni publikigas 3 el ili. Alia unu estis publikigita jam en nia oktobra n-ro.

mia bofratino

Isiguro Tomoko

Mia bofratino forpasis en la dekkvara de aŭgusto. Funebra ceremonio okazis en la dudeka de aŭgusto.

Ŝi estis okdek kvar jarojn aĝa. Ŝia demenco komenciĝis, kiam ŝi estis iom post sepdek-kvina jaraĝo. Tial estis malfacile por ŝi kune vivi en la familio. Do ŝi transloĝiĝis al domo de maljunuloj kaj vivadis ĉirkaŭ kvar jarojn tie.

Tiu ĉi institucio troviĝas en proksima urbo de nia domo. Do mi kaj mia edzo kelkfoje vizitis la domon. Komence ŝi povis piediri, sed iam ŝi falis kaj devis vivi per la helpo de radseĝo, kaj eniris en hospitalon.

De tempo al tempo ŝi rememoris sian pasintan tempon. Sed iom post iom ŝi sentis sin dormema tuttage. Tamen ni kunportis libron de infanaj kantoj kaj ankaŭ molan pilkon. Kiam ni kantetis, ankaŭ ŝi nature kaj kune kantis kelkajn kantojn en sia ĉambro, preskaŭ ĉiam flue. Ankaŭ ni ludis per mola pilko kun ŝi.

Mi sentis ke ŝi tre ŝatis infanajn kantojn en sia juna tempo, kaj tio konsolis ŝin en milita tempo. Mi miras pri memoritaj spertoj, instinkto kaj mistereco de homoj. Unu tagon antaŭ la forpaso, ŝia stato estis bona kaj povis vespermanĝi. Tio trankviligis min kaj mian edzon.

mia decido

Miyakawa Masako

Komence de la somero mi decidis atenti sekvajn tri aferojn.

Unue, mi ekzercu min per persona komputilo. Post la morto de mia edzo mi malfacile uzas personan komputilon, kaj do mi volas ekzerciĝi.

Due, mi aranĝu mian ĉambron, ĉar mia ĉambro havas multajn senutilaĵojn.

Trie, mi legu libron de Esperanto, ĉar mi kutimiĝis al mallaboremo pri legado de Esperantaj libroj.

Sed la somero de ĉi tiu jaro estis speciale varmega kaj tial mi preskaŭ nenion praktikis.

Tamen mi havis intereson pri muskolo. La muskolo estas grava kontraŭ maljuniĝo de la cerbo. Manĝaĵoj kun plena proteino instigas homojn sporti. Tio ne rilatas al aĝo. Mi volas persiste multigi muskolon. Mi deziras vivi sane kaj komforte en mia maljuneco.

Atombomba Placo en Hiroshima

Miyakawa Masako


Mi veturis al la Atombomba Placo de Hiroshima kun mia filino kaj miaj nepinoj.

Ĝis nun ĉi tiun placon mi vizitis du-foje. Multaj homoj vizitis la Atombomban Placon por sia studo. De ĉiĉeronino ni ricevis klarigon pri la atombombo.

Antaŭ 73 jaroj en tiu tago la usona armeo ĵetis atombombon. Matene en la ĉielo troviĝis neniom da nuboj.

Ni multe larmis kiam ni rigardis papergruojn, kiujn infanoj faldis. Nuntempe estas multaj homoj sen spertoj de militoj. 73 jaroj pasis post la milito. Mi forte esperas pacon kaj senmilitan mondon.

Mi rigardis la papergruon, kiun faldis la tiama prezidento de USONO, Obama, en la ekspoziciejo.



en somera Lisbono

Kayahara Rieko

Pri Universalaj Kongresoj

En la lasta jaro mi partoprenis en la Universala Kongreso kaj do en tiu ĉi fojo mia partopreno estis por la dua fojo.

Sed mi restis ankoraŭ komencanto kiel antaŭe. Same kiel en la lasta fojo en la Seula UK, mi ne parolis kun aliaj partoprenantoj, kiuj venis el diversaj landoj de la mondo.

Mi vidis, ke koreaj esperantistoj interparoladas aktive kaj ĝuas tion. Mi pensis, ke mi perdas ŝancon, ne farante interparoladon en Esperanto kun aliaj.

Efektive mi pensis, ke pli da plezuroj mi havus, se mi povus paroli en Esperanta lingvo.

Pri la urbo Lisbono

En la urbo Lisbono, tagoj estas longaj kaj lumas eĉ post la naŭa horo.

Post kiam mi ĉeestis en la konversacia kurso, mi ĉirkaŭvadis por turismo tra Lisbona urbo. Tie estas multaj deklivoj, kaj la vojoj estas pavimitaj per ŝtonoj. Mi forte pensis ke mi devas hardi gambojn por ĝui vojaĝon.

Manĝaĵoj estis tiel bongustaj kaj plaĉis al mia gusto, kaj tial mi ne sopiris al japaneska kuirado.

Pri metroo

Metrooj en Lisbono estas simplaj, ĉar metroaj linioj estas distingitaj laŭ kvar koloroj. Ĝi diferencas de la Japania metroo, ĉar nur nomo de la stacio estas indikita sur la kajo. Tie ne estas skribita la nomo de la sekvanta stacio. Oni elektas nur kajon laŭ sia volo por iri al la direkto, kiam oni envagoniĝos. Ĉar la celata loko ne diferencis laŭ la vagono, malsame de la metroo en Tokio.



stacia ŝildo en Lisbono

Strat-artistoj

En prospera zono estas strat-artistoj. Strat-artistoj aperis de vojkrucado apud mia tranokto-hotelo, kvankam tie ne estas prospera zono. Mi estis surprizita. Ili aperas matene kaj vespere en trafike densaj horoj.

Dum iometa tempo de ŝanĝiĝo de la trafika signalo, ili (strat-artistoj) ludas ĵongladon kaj tiel plu, kaj kolektas monerojn el veturantoj de aŭtomobiloj. Mi pensis, ke tio ŝajnas tre urĝa, kaj tamen tio estas interspaco de industrioj, kaj ili vivas vikle kaj energie.



Reveno al la Japanio

Mi partoprenis en la Lisbona UK kaj ankaŭ en postkongreso en Porto, kaj la vojaĝo estis dum 16 tagoj, kaj tio estas por mi unuafoja longa vojaĝo.

En la revena vojo al Japanio, en ŝanĝa loko de aviadilo en la flughaveno de Dubajo, mi apenaŭ povis kapti la aviadilon. Mi kuris de unu rando al la alia en la flughaveno.

Estis diversaj okazintaĵoj, sed mi povis havi ĝojan tempon.

Nekrologo

S-ino Hirose Kanae (1938-10-09 / 2018-11-01)

S-ino Hirose Kanae lastatempe forpasis pro malsano. Ŝi eksciis pri Esperanto en 1965, leginte ĵurnalan artikolon pri la 50a Universala Kongreso okazinta en Tokio, kaj eklernis Esperanton en Tokio. Post edziniĝo, ŝi loĝis en Jokohamo, kaj agadis en diversaj kampoj.

Ankaŭ ŝia filino Hirose Madoka estas nia membro.

Eseo

pri la filmo “Sturmo de Johano Arima”

Sibayama Noriko

Mi legis la artikolon titolitan "Pri la dialogoj en la filmo Sturmo de Johano Arima 1959" de s-ro Huĝimoto Tacuo (en La Revuo Orienta junia numero 2018). En la filmo, Esperanto estas uzata kiel la patrino lingvo de fikcia lando "Iberio". Kiam oni produktis la filmon s-ro Huĝimoto gvidis kaj kontrolis pri uzado de Esperanto en la filmo kune kun s-ro Umesao Tadao. Sed post publikigo de la filmo, kelkaj esperantistoj plendis, ke la esperanta parolo estas ne klare aŭdebla, ne komprenebla. Iu eĉ diris, ke ĝi estas kansaja dialekto. Tial s-ro Huĝimoto demandas, ĉu vere la esperanta parolo estas tiel malbona.

Mi kaj Zyun'iti antaŭ kelkaj jaroj unufoje spektis la filmon televide, kaj registris ĝin en DVD. Do ni deziris denove spekti ĝin kaj kontroli ĉu la Esperanto estas tiel malbona.

En la filmo, Esperanto estas ofte uzata tra la tuta sceno, kaj en grava sceno japanlingva traduko aperas sur la ekrano. En tia sceno mi relative facile komprenis la Esperanton parolatan de aktoroj. Sed tamen en batal-sceno, kapti la sencon de Esperanto estis malfacile. Iom poste mi povis diveni, "Verŝajne nun li diris tiel."

Mi opinias, ke ĉiu aktoro parolas Esperanton monotone. Japanaj aktoroj povas paroli monotone, ĉar Esperanto estas fremda lingvo en la filmo, tamen Iberiano devas paroli glate kaj verve, ĉar Esperanto estas lia patrino lingvo. Ili ne emfazas gravajn vortojn en konversacio, ĉar kredeble ili ne komprenas enhavon de la parolo.

Tial kapti la parolon estas malfacile. Plie prononco de alilandaj aktoroj ne estas klara.

Antaŭ ol verki tiun ĉi paperon, mi iom konsultis rete pri la filmo, kaj mi eksciis tre interesajn faktojn. Unue, la filmo estis komence planita kiel tutkolora filmo, tamen granda modelo de militŝipo multekosta difektiĝis pro neatendita tajfuno, pro tio mankis kapitalo kaj oni filmis ĝin en monokromato, kaj filmis en studio sed ne sur maro. Due, en tiu tempo (1959) kredeble mankis eksterlandaj ekstruloj, pro tio japanoj ludis rolojn de eksterlandaj militistoj kaj aliaj. En popolamasa sceno de iberianoj, nur antaŭaj kelkaj estis alilandanoj kaj multaj malantaŭaj estis japanoj kun ruĝhara peruko. Kaj iu recenzisto taksas la filmon kiel triaklasan filmon inter Itikawa-Raizo-verkaro*.

Ĉi-foje mi spektis la filmon precipe atente al Esperanto, sed mi rimarkis ion ankaŭ pri la japana lingvo. Nome en nuntempaj historiaj dramoj, aktoroj parolas pli moderne ol en tiamaj filmoj por ke junaj spektantoj povu kompreni. Se en estonto junaj esperantistoj spektos tiun ĉi filmon, ĉu ili povos ĉion kompreni eĉ la japanlingvan parton, mi antaŭtimas.

Alia impresio:

Sur titola ekrano aperas kelkaj preskaŭ forgesitaj nomoj de aktoroj, kaj ili revivigas mian karmemoron. Precipe Yamamura So ludas honoran rolon en tiu ĉi filmo.

Entute la filmo donas ne tre agrablan senton finspektinte, tamen ĝi estas sufiĉe interesa al esperantistoj, mi opinias.

* Itikawa Raizo estas fama aktoro.

(注) 映画の原題:「ジャン・有馬の襲撃」

